

## Jan Welzl mistifiko?

/ 1. IV. 1933. /

En la aŭtuno de la jaro mil-naŭcent-dudek-ok, senbrue revenis en sian patrujon, Ĉeĥoslovakujon, homo, kiun la angla gazeto "Country Life" nomis la plej mirindan viron de la estanteco. Revenis aventuristo, kiun antaŭiris la plej nekredeblaj onidiroj. Revenis homo, kiu vivis tridek jarojn en la plej alta nordo, for kaj izolita de ĉiu civilizacio, kien ne penetris eĉ la muĝantaj ondoj de la Mondmilito, kien ne penetris la sciigo pri la nova aranĝo de l' eŭropa kontinento. Tie li vivis inter la indiĝenoj, kies estro li onidire estis. En tiu aŭtuna tago revenis Jan Welzl, naskiĝinta en malgranda urbeto de norda Moravujo. Li tute ne aspektis kiel oni ordinare imagas aventuriston. Revenis viro kun respektinda ventreto kun ĉiam gaje ridetanta vizaĝo, ronda kiel la plenluno. Des pli mirindaj estis liaj nekredeblaj rakontoj kaj multaj el liaj unuaj aŭskultantoj ne sciis, ĉu kredi aŭ ne. Ridetante li rakontis siajn aventurojn kun vere infana naiveco. Aventuristo kaj naiveco, kia kontrasto!

Du redaktoroj de unu el la plej disvastigita ĉeĥa gazeto, "Lidové noviny", esperante: ~~popola gazeto~~, ebligis al li publikajn paroladojn en Brno, kie li baldaŭ trovis tre dankan, multenombrian aŭskultantaron. En vero li ne prelegis, sed rakontis el sia vivo en lingvo tre stranga, ofte eĉ nekomprenebla. Forgesinte sian gepatran lingvon, li parolis lingvan miksaĵon el elementoj de germana, angla kaj rusa lingvoj, sed kun ĉeĥaj finiĝoj. Krom tio li scipovis dekon da eskimaj dialektoj. Vere, dum liaj strangaj, nekutimaj rakontoj neniam enuiĝis liaj aŭskultantoj. Ankaŭ la aŭskultantoj de nia radio-stacio havis la plezuron aŭskulti lin. Fine invitis ĉi tiun unikan viron la prezidanto de la respubliko. En sia bonhumoro li honoris sian gaston, la eskimestron, per la titolo: kolego.

Liajn rakontojn stenografis la jam menciitaj du redaktoroj kaj eldonis ilin en libra formo sub la titolo: Tridek jarojn en la ora nordo. La multaj tradukoj en fremdajn lingvojn vekis laŭtan, aprobantan eĥon. La legantoj de la Heroldo de Esperanto certe ankoraŭ memoras la eksterordinare favoran kritikon. La angla gazeto "Observer" skribis: Ĝi estas heroa aventuro. La libro sorĉe impresas de la paĝo unua ĝis la lasta. Ĝi certe estas unu el la plej mirindaj arktaj historioj, kiuj estis iam skribataj. La leganto eĉ spiri forgesas.

Tiel entuziasme estis akceptata la libro de la anglaj gazetoj. Malan sorton ĝi havis en Ameriko. Unu parto de la kritikistoj deklaris ke la tuta verko estas fantaziaĵo, aliaj diris, ke la kerno estas vera, sed ke la plej granda parto estas fabelo, la lastaj opiniis, kaj inter ili multaj rekonitaj fakuloj kaj esploristoj, ke ĉio estas vera, aŭ ŝajnas esti vera, sed ke oni la veron neniam pruvos, ĉar temas pri vivo en teritorioj, kiujn neniu konas.

La diskuton finigis s-ro Stefansson, rekonita arkta aŭtoritato. Li deklaris, ke la tuta libro de Welzl estas mistifikaĵo, kies sola celo estas, kontroli la nekritikan kredemon de l' naivuloj. Plue li kuraĝis aserti, ke Welzl tute ne ekzistas. Stefansson, kies granda aŭtoritato apogas sin al lia pasinteco kiel esploristo, ridindigis la aŭtoron, kiu montris nekredeblan malklerecon, eble intencitan, sed kiu klare pravas, ke ĉio estas stulta mensogaĵo kaj aĉa babilaĵo. Ĉiu, kiu nur iome tuŝis la altan nordon, scias, tiel deklaris s-ro Stefansson, ke sur la insularo de Nova Siberio indiĝenoj ne loĝas kaj neniam loĝis. Tamen la fabela Welzl elektis ĝuste ĉi tiun teritorion kiel fonon por siaj babilaĵoj. Jen la plej konvinka pruvo lumiganta la mensogon. — Tiel s-ro Stefansson.

Ĉar multaj samideanoj legis ĉi tiun mirindan libron aŭ en lingvo esperanta aŭ en sia nacia, ni ŝuldas al ili klaran respondon. Eble ili eĉ legis la frakasantan kritikon.

Nia respondo devas enhavi du pruvojn:

unue, ke Jan Welzl ekzistas,

due, ke Jan Welzl rakontis veran travivaĵon.

Pri la ekzisto de Welzl konvinkigis s-ro Stefansson mem. Karel Čapek, kies verko ~~RUR~~ estas konata al la esperantistaro, kaj al kiu Stefansson alskribis la aŭtorecon de la libro ~~Tridek jarojn en la ora nordo~~. Oni sciigis al li la adreson de Welzl, kiu vivas nun en Dawson, en la plej norda parto de Kanado. Kaj post kelka tempo venis al Brno letero de Welzl kun jena enhavo: (mi citas laŭ la ~~jam nomita~~ gazeto: Lidové noviny.) Welzl skribas: El Nova Jorko venis letero de nekonata homo al ia

Amerikanino-jurnalisto, ke ŝi konvinkiĝu, ĉu mi estas la viro, kiu skribis la libron kaj, ĉu mi estas frenezulo aŭ homo kun normala racio. La juna virino venis, kaj esploris min kaj trovis, ke mi estas tute normala. Ŝi demandis min, ĉu mi estas Jan Welzl, kiu rakontis la libron. Mi diris: Jes, tio estas mia vera nomo. — ~~(Speciale ĉagrenis nian rakonteman aventuriston, ke oni lin prezentas al la amerika publiko, kiel mensoganton kaj trompanton ŝtelantan monon el la poŝoj de liaj legantoj.)~~

Restis la dua pruvo. Sed kiel pruvi al la mondo kaj speciale al la fakulo Stefansson la ekziston de homoj en teritorio, kiu havas sur landkartoj blankan koloron, koloron de tero nekonata. Pruvo ŝajnis ne ebla. ~~Restis ŝajne nenio ol konsilo, ke li tien vojaĝu kaj konvinkiĝu.~~ Tamen helpis ĝustamomente la hazardo. Hazardo tute neatendita. La kvindek-dua numero de la germana gazeto "Kölnische illustrierte Zeitung" ~~(esperante: Kölna ilustrita gazeto)~~ montris 8 fotografaĵojn, kiujn faris la sovjeta ekspedicio de Pinjeginov, ~~kiu estis devigata vivi du jarojn sur tiu insularo, kaj, kiel opiniis s-ro Stefansson, forlasita de l' dio kaj homo.~~ La fotografaĵoj montras la indiĝenojn de Nova Siberio, vivantaj per ĉasado, kiuj kutimas elekti siajn estrojn. Iam ilia estro estis Jan Welzl. Sed la bildoj pruvas ne nur la veremon de la iama eskimestro, sed ankaŭ lian rimarkindan arton, per kiu li tiel nekredeble plastike rakontis kaj priskribis la vivon de siaj iamaj kunuloj.

Do ankaŭ la dua pruvo plene sukcesis. Tiel finis la disputo inter fakulo kaj praktikulo, kiu kuraĝis scii kaj koni pli ol la unua permesis. Aŭdante la interesan disputon, kiu esperantisto ne pensas pri la batalo de nia Majstro kontraŭ la antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj de la fakulaj rondoj?

Al amikoj, kies scivolemon mi eble vekis per mia parolado, mi sciigas, ke la libro Tridek jaroj en la ora nordo estas havebla aŭ ĉe nia ĉefdelegito de UEA, s-ro O. Sklenčka en Hradec Králové, aŭ ĉe Heroldo de Esperanto en Köln. Prezo: tridektri ĉeĥaj kronoj aŭ kvar germanaj markoj kvindek pfenigoj.

Bonan nokton!